GVIDLIBRO

TRA TARTU

91
67

Signoklarigoj: ◉ urboj kun pli ol 50.000 loĝantoj; ● urboj kun pli ol 20.000 loĝantoj; ■ urboj kun pli ol 10.000 loĝantoj; ▲ urboj kun malpli ol 10.000 loĝantoj; ----- ŝtata limo; ..... distrikta limo.

Est. A-4663

GVIRDLIBO

TRA LA UNIVERSITATURBO

TARTU

6467

40332.

AKADEMIA KOOPERATIVO
TARTU 1932

El statistiko pri Estonio.

Teritorio: 45.549 km².

Loĝantaro la 1. I 1932 — 1.119.518. Naskiĝoj 0,9—1,0%; natura alkresko 0,23—0,36%. El tio (1922) estonoj — 87,6%; rusoj 8,3%; germanoj 1,7%; svedoj 0,7%; hebreoj 0,4%; aliaj 1,3%.

Konfesio: ev.-luterana 78,6%; greka-katolika 19%.

Kamparloĝantaro (1931) 67,5%, en urboj kaj urbetoj 32,5%. Per terkulturado estas okupitaj 58,8%, per industrio 15,2%; per komerco 4%.

Tuta nombro de la bienetoj (1929) 133.357 kun 3.093.749 hekt. da tero. Antaŭ la agrara reformo 2.428.087 hekt. (58% de la tero) apartenis al 1.149 grandterposedunuoj kaj 1.761.015 hekt. (42%) al pli ol 50.000 bienetoj.

Plej gravaj eksportaĵoj (1930): butero (32,7%), ligno kaj lignoindustriaj produktaĵoj 14,5%, papero kaj papermaso 14%, kotonaj ŝtofoj kaj fadenoj 13,3%.

K l e r i g o. En 1930/31 ekzistis 1261 elementaj lernejoj kun 105.414 lernantoj kaj 3.946 instruistoj — kostoj 7,6 milionoj da kronoj; 77 mezlernejoj kun 14,919 lernantoj kaj 949 instruistoj — kostoj 2,68 milionoj da kronoj. 14% de la ŝtata budĝeto, balancita per ĉ. 70 milionoj da kronoj, estis dediĉitaj al la klerigo.

Urboj, laŭnombre 18, el ili la pli grandaj (1. I 1932):

Tallinna (Reval)	133.634;
Tartu (Dorpat)	71.543;
Narva	24.970;
Pärnu (Pernau)	20.660;
Nõmme	13.408;
Viljandi (Fellin)	12.841;
Rakvere (Wesenberg) . . .	12.418;
Valga (Walk)	11.999.

En 1922 el la loĝantaro de Tartu estis: estonoj 84,5%; germanoj 6,4%; rusoj 5,1%; hebreoj 2,2%.

Okupitaj per industrio 30,1%, per komerco 14,2%; oficistoj kaj liberprofesiuloj 13,5%; transporto 5,3%. Lernantoj — preskaŭ 20% de la loĝantaro.

Est:A
TARTU ÜLIKOOLI
RAAMATUKOGU
31011
142595320



Avifoto de la urba centro kun la konstruaĵoj de la Universitato.

Vidindaĵoj en Estonio por eksterlandanoj.

Estonio estas ebenaĵo kun absolutaj altaĵoj plejparte malpli ol 100 m. La plej alta punkto en Sud-Estonio (18 km sude de Võru), la Granda Munamägi (Ovmonto), havas absolutan altecon de 317 m (vasta vidaĵo al morenmonteta pejzaĝo, vidaĵturo).

La tero estas modlita per glaciepoka efikado de la enlanda glacio kaj montras glaciepokajn formojn de surfaco, parte klasikspecajn: remparmontoj aŭ „åsar" (precipe en la ĉirkaŭaĵo de Rakvere), drumlinoj (tre tipaj formoj, atingeblaj de Tartu jam per unuhora aŭtomobila veturo tra Vasula, Saadjärve aŭ per duontaga fervoja veturo — Tartu-Jõgeva ĉ. 1 horon — en la ĉirkaŭaĵon de la stacioj Tabivere, Kaarepera, Jõgeva). Kames-formacioj kaj finmorenoj sude de Tartu en la ĉirkaŭaĵo de Otepää-Pühajärve, kun morenlagoj, fluvaloj kaj sablaĵoj (atingeblaj per kelkhora aŭtomobilveturo tra Kambja-Pangodi-Pühajärve-Kanepi-Põlva-Kuuste-Reola-Tartu, aŭ fervoje al Palupera kaj de tie per aŭtobuso al Pühajärve — 1 tagon).

En Estonio oni povas viziti vastajn, preskaŭ netuŝitajn arbarajn regionojn en Virumaa, Alutaguse (kie eĉ estas troveblaj ankoraŭ ursoj) aŭ en Pärnumaa. Grandaj marĉoj ekzistas jam proksime de Tartu (14 km okcidente, ĉe Ulila, kie trovigas elektrostacio), facile atingeblaj, same de Tallinna (Ellamaa, Aruküla) kaj de Pärnu (Jõõpre k. a.).

La plej grava pejzaĝa vidindaĵo estas tamen la N o r d - E s t o n i a k r u t a m a r b o r d o, precipe en Virumaa, inter Kunda kaj Narva, sed ankaŭ ĉe Tallinna, Paldiski kaj ĉe la norda bordo de Saaremaa (Ösel).

La plej altan krutecon ĝi prezentas en Virumaa (Ontika) 56 m). La kruta marbordo permesas sur longa spaco enrigardon en la kambri-ordovician tavolaron de Nord-Estonio kaj kunhelpis al tio, ke Estonio fariĝis klasika lando por la geologio de la menciitaj tavoloj. Por paleontologoj ekzistas ĉe la kruta marbordo kaj en la interno de la lando bonegaj kolekteblecoj.

Proksime de la kruta marbordo, en Virumaa, vidindaj estas la „kukerkzit"-ston- (brulskist-, oleoskist-) minejoj, minejaroj kaj oleproduktaj instalaĵoj de la plej grava provizejo en Estonio (plej gravaj minejoj: la ŝtata oleoskist-industrio ĉe la stacio Kohtla, „Eesti Õlikivi" A/S. proksime de Püssi). Kun la kruta marbordo estas ligitaj ankoraŭ aliaj industrioj, karakterizaj por Estonio: cimentfabrikoj en Kunda

kaj Aseri (nuntempe ne funkcias), celulozfabrikoj ĉe akvofaloj en Jägala kaj Joaveski, ĉar la kruta marbordo estas la kaŭzo de la akvofaloj de preskaŭ ĉiuj riveroj, fluantaj al nordo. La plej konsiderinda akvofalo estas ĉe Narva (kun 75.000 HP), de kiu nur ĉ. 10% estas utiligitaj — teksmanufakturoj.

Narva prezentas gravajn historiajn memorajojn (rusa kaj sveda fortikajoj unu kontraŭ la alia, batalkampoj inter Karlo XII kaj Petro I en 1700 kaj de la Liberiga Milito de Estonio en 1918—1920). De Narva estas ankaŭ atingebla la severe gardata Sovetruslanda limo, kiu estas vizitebla ankaŭ en la sudo de Estonio en Irboska.

Historiajn vidindajojn prezentas antaŭ ĉio la ĉefurbo T a l l i n n a (malnova hansaurbo); P ä r n u (iama refuĝejo de la Universitato), la plej bone organizita kuracloko en Estonio; V a l g a kun la originala markado de la limo meze tra la urbo; K u r e s s a a r e kaj H a a p s a l u kun famaj ŝlimbanoj kaj kastelruinoj (en Kuressaare preskaŭ tute sendifektaj).

Historiaj ruinoj ekzistas en la proksimeco de preskaŭ ĉiuj malgrandurboj (Rakvere, Paide, Viljandi, Tõrva, Võru), dum P e t s e r i permesas enrigardon en unu el la malmultaj ankoraŭ ekzistantaj rusaj monakejoj kun ĝia karakteriza vivo; ĉe I r b o s k a staras la ruinoj de rusa fortikajo, konstruita kontraŭ la estonoj kaj glavordenanoj, kie ankoraŭ nun oni montras la laŭdiran tombon de T r u v o r, unu el la du laŭlegendaj fratoj de la varjaga reĝo Rurik, kiuj estis alvokitaj por regi Ruslandon.

En la ĉirkaŭajo de Petseri la s e t u o j aŭ estonoj de la iama Pihkva-distrikto, ortodoksaj estonoj, estintaj dum jarcentoj sub rusa influo, prezentas multe da etnografiaj vidindajoj, koncenrnantaj objektkulturon kaj ankaŭ folkloron. Naciaj kostumoj kaj praaj popolmoroj estas plue konservitaj ankoraŭ sur la insuloj (Muhu — estonaj, Ruhnu — svedaj).

Pri la dominanta kampkulturo kaj la kampara loĝantaro mem oni ricevas ĉie en la kamparo bonan imagon. Grandterkulturistoj ekzistas pli grandnombre en la Suda Estonio, dum en la Okcidenta Estonio kaj sur la insuloj la riĉeco estas pli malgranda pro la malboneco de la grundo. Specialan konsideron meritas la kolonioj, estiĝintaj post la agrarreformo sur la terproprajoj de la antaŭa grandterposedantaro, kie la koloniistoj, ofte liberecbatalantoj el la estona Liberiga Milito, scipovis konsiderigi sin kun granda persisteco kaj rezignadoj.



Universitata ĉefkonstruaĵo.

Rondiro tra la universitata urbo Tartu.

La ĉefa konstruaĵo kaj la „malnova Universitato".

La rondiron tra la urbo ni komencas ĉe la monumento de la sveda reĝo Gustav Adolf II ĉe Jakobistrato, ĉe la ĉefa konstruaĵo de la Universitato. Tiu ĉi monumento de la fondinto de la Universitato, inaŭgurita la 27. VI 28, estas donacita de la Sveda-Estona Societo en Stockholm (laŭ iniciato de konsulo J. Fagraeus kaj B. A. Holmgren) al la Universitato okaze de la 10-jara ekzistado de la Estona Respubliko.

Gustav Adolf II subskribis la 30. VI 1632 en la milittendaro ĉe Nürnberg la fonddokumenton de la Universitato. El la tempo de tiu ĉi unua, sveda universitato, kiu funkciis en 1632—56 kaj 1690—99 en Tartu, 1699—1710 en Pärnu (kun interrompo kaj transloĝiĝo pro militcirkonstancoj), konserviĝis neniaj konstruaĵoj.

La ĉefkonstruaĵo de la Universitato kaj la plej multaj aliaj konstruaĵoj ĉe la Kastela Monto devenas de la refonda tempo de la Universitato post 1802. La meza fasado de la ĉefkonstruaĵo, konstruita en klasicista stilo, devenas de la jaroj 1803—1809 (prof. de arkitekturo J. W. Krause). La aloj estas konstruitaj en 1856—1859 kaj la Universitata preĝejo, troviĝanta en la korto, ekzistas de la jaro 1860.

En la ĉefkonstruaĵo krom la ejoj por la admi-

Anĝelponto.

nistracio kaj 6 aŭditorioj (ĉefe por uzado de la teologia, jura kaj filozofia fakultatoj) estas lokigitaj tri institutoj:

Instituto kaj Muzeo de la Klasika Arkeologio (en la maldekstra alo), fonditaj en 1803 de prof. K. Morgenstern. Malfermitaj dimanĉe de la 12-a ĝis la 14-a. Direktoro prof. W. Süss. Pli ol 300 gipskopioj de la antikva skulptarto, ĉ. 15.000 gematoj etc. Ekzistas katalogo.

Kemia Instituto (en la dekstra alo, teretaĝo kaj III etaĝo). Direktoro prof. P. Kogermann. Laboratorioj por anorgana, organa kaj teknologia kemioj.

Fisika Instituto (dekstra alo, II etaĝo). Direktoro prof. J. Wilip. La plej granda kolekto de fizikaj aparatoj en Estonio.

Antaŭ la konstruado de la ĉefkonstruaĵo la Universitato estis lokigita en la t. n. domo de v. Bock (kontraŭ la ĉefkonstruaĵo, angulo de Jaani- kaj Jakobi-str.) kaj ĉe Suurturg, angulo de Rüütli-str., en la t. n. „malnova Universitato".

En la unua troviĝas nuntempe la polikliniko (prof. H. Koppel) kaj la Matematika Instituto (II etaĝo, prof. G. Rägo).

Tiu ĉi domo estis iam preskaŭ tute okupita de la Instituto por Farmacio, kie laboris la fama farmakologo I. G. Dragendorff. Drogkolekto, fondita de li, estas rimarkinda ankoraŭ nuntempe en la Instituto por Farma-

Astronomia observatorio.

kognozio, troviĝanta ĉi tie (dir. prof. I. Stamm). Krom tio ĉi tie estas ankaŭ la Instituto por Farmacia Kemio (dir. prof. H. Parts).

En la sama domo troviĝas plue ankoraŭ la Instituto por Varkonado kaj la Statistik-Ekonomia Instituto.

La Kastela Monto.

La ĉefparto de la universitataj konstruaĵoj troviĝas sur kaj ĉe la Kastela Monto. Tiu ĉi monto (ĉ. 600 m longa, 200 m larĝa, kun 20 m da relativa alteco) mem ja prezentas vidindaĵon en la topografio de la urbo. Dum ĝia nord-okcidenta flanko estas formita de la natura valdeklivo de Emajõgi, la Vallikraavi-str., la „rempara fosaĵo", ĝia okcidenta kaj sud-okcidenta limigo certe estiĝas ĉefe en artefarita maniero. La nomo montras al la signifo de tiu ĉi fosaĵsimila kavaĵo: la malnova fortikaĵmuro etendiĝas ĉe la okcidenta kaj sud-okcidenta randoj de la Kastela Monto.

En la 17-a kaj 18-a jarcentoj la elstaraĵoj de la Kastela Monto al nordokcidento (kontraŭ la Sovaĝa Kastelmonto), al sudokcidento (ĉe la Kirurgia Kliniko) kaj sude (ĉe la Anatomiejo) estiĝis kiel bastionoj. La ombroriĉa parko estas ekaranĝita en 1803.

De post la refondo de la Universitato en 1802 al ĝi apartenas la Kastela Monto kun areo de ĉ. 15,5 hektaroj.

De la Urbdoma Placo ni supreniras la Kastelan Monton tra Lossi-strato, kiu trairas sub la Anĝela Ponto. Tiu ĉi



Ruinoj de la Petro-Paŭla katedralo.

ponto, konstruita en 1836—38 laŭ la planoj de ark. M. H. Jakobi (renovigita en 1902), havas flanke de la Kastela Monto la reliefportreton de la unua rektoro de la Universitato, rekonstruita en 1802, G. F. Parrot, persona amiko de caro Aleksandro I. La supreniranton salutas la afabla surskribo „Otium reficit vires".

Alveninte supren, ni havas dekstre la plej malnovan klinikkonstruaĵon — nuntempe la Instituto por internaj malsanoj (dir. prof. E. Masing), konstruita en 1806—08, origine destinita por tri klinikoj, rekonstruita el malnovaj fortikaĵkazernoj.

La dekstre kuŝanta pli moderna domo estas la Virinkliniko (dir. prof. J. Miländer). Konstruita en 1840—42, plivastigita kaj rekonstruita en 1911.

Dekstre, rekte ligita kun la Interna Kliniko, troviĝas la I. Kirurgia Kliniko, ligna alokonstruaĵo el la jaroj 1874—75, kiam la fama kirurgo E. Bergmann (1871—78) ĉi tie laboris. La 30. VIII 1913 kontraŭ la kliniko, ĉe la rando de la Kastela Monto estis malkovrita por li monumento (skulptisto A. Hildebrand). Antaŭ li laboris en Tartu la fama rusa kirurgo N. J. Pirogov (1836—41) kaj G. F. Adelmann (1841—78). Konatan posteulon havis la nomitaj en la persono de prof. M. Zoege v. Manteuffel (1889—1918).

Sude de la Virinkliniko staras la hufoferforma Anatomiejo. La meza parto konstruita en 1803—05, la aloj en 1825—27.

Gi enhavas krom la Anatomia Instituto (dir. prof. E. Veinberg) ankoraŭ la Farmakologian (direktoro prof.



La universitata biblioteko en la katedralruinoj.

E. Barkan), la Histologian (dir. prof. H. Kull), tiun de la Jura Medicino (dir. prof. A. Ucke) kaj de la Operacia Kirurgio.

Pli frue ĉi tie laboris la konataj anatomiistoj K. Fr. Burdach (1811—14), Chr. H. Stieda (1864—83) kaj A. Rauber (1886—1912).

Antaŭ la Anatomiejon oni starigis en 1930 buston de dr. med. F. R. Fählmann, la unua estona altlerneja instruisto laborinta en 1842—50 kiel lektoro de estona lingvo, krome havinta kelktempe ankaŭ instrutaskojn pri farmakologio kaj receptado (1843—1845).

Sur la plej orienta elstaraĵo de la Kastela Monto, ne malproksime de la Anatomiejo, staras la Astronomia Observatorio, konstruita en 1807—10. Direktoro prof. D. Rootsmann. Tie ĉi estis okupitaj la konataj astronomoj F. G. v. Struve (1813—40) kaj J. H. Mädler (1840—65).

El la aparataro estas menciinda unu Fraunhofer-refraktoro kun 24 cm objektivdiametro (starigita en 1924), la plej granda instrumento tiutempa: ĝi servas kiel anstataŭanto de Zeiss-refraktoro kun ĉ. 20 cm objektivdiametro (starigita en 1911).

De la mezepoka episkopa kastelo, sur kies loko staras la Observatorio, konserviĝis parte nur la subteraj kelkonstruaĵoj.

De la Observatorio oni havas belan vidaĵon al la urbo.

La efektiva ĉefmonumento de la mezepoka Tartu estas la ruinoj de la Katedralo de Petro-Paŭlo sur la nordokcidenta Kastela Monto. Trinave konstruite en la 13-a jar-



Nova universitata konstruaĵo ĉe Aia-str. 46.

cento, la preĝejo en la 15-a jarcento ŝanĝiĝas je kvinnava baziliko kun du turoj. En junio 1624 incendio detruis la preĝejon. En 1763—67 la turoj estis deportitaj. En 1803—06 oni rekonstruis el la pli bone konserviĝinta korusejo de la ruinoj ejojn por la Universitata Biblioteko. En 1928—29 oni pligrandigis la konstruaĵon.

La biblioteko posedas rondcifere 600.000 volumojn. Krome multajn valorajn dokumentojn, manuskriptojn, bildojn kaj gravuraĵojn. Interalie la 13-voluman familian arkivon de De la Gardie (16. kaj 17. jarc.) kun la leteroj de Gustav Adolf II. Krome leterojn de Luther, Melanchthon, Goethe k. a.

En ne tre sukcesa maniero la urba arkitekto R. Guleke (1889) konstruis sur la dekstran turon de la ruinoj alkonstruaĵon por la akvorezervujo de la universitataj institucioj.

Norde de la ruino estas tri monumentoj. En la fino de la ĉefaleo troviĝas monumento de K. E. v. Baer, kiu en 1810—14 studis medicinon en Tartu kaj poste ĉi tie ankaŭ pasigis sian vivofinon kaj mortis. La monumento, verko de Opekuschin, estis malkovrita la 11-an de nov. 1886.

Proksime de ĝi staras obelisko, starigita (1851) je la memoro de prof. Karl Morgenstern, kiu havis grandajn meritojn ĉe la organizado de la Universitato (de 1802).

La plej nova monumento sur la Kastela Monto estas tiu de V. Reiman, grava ideologo en la fako de la estonaj kulturceladoj kaj esploristo de la historio de Estonio. Malkovro de la monumento la 27. IX 31.

En la proksimeco de la Reiman-monumento kuŝas antaŭ-



Paŭlus-preĝejo.

historia oferŝtono de nedifinebla aĝo. Apude la plej alta altaĵo de la Kastela Monto (en la loko de la mezepoka granda turo — „Moskaŭa Rondelo"), de kie oni havas vastan vidaĵon sur parton de la urbo kaj la rivervalo.

Universitataj institucioj apud la Kastela Monto.

De la Kastela Monto ni povas malsupreniri rekte de tiu rigardejo en la direkto de la proksime troviĝanta katolika preĝejo (konstruita en 1895—99, ĉe Veski-str.).

Malsupre en la remparfosaĵo ni turniĝas maldekstren. Dekstre restas la „Sovaĝa Kastelmonto" kun la kavaĵo de malnova gruzfosejo.



Teatro kaj societejo „Vanemuine“.

Dekstre supre, ĉe Veski-str. 6, troviĝas Infankliniko de proksimume 1912 (dir. prof. A. Lüüs).

Rigardante pli malproksimen, ni ekvidas maldekstre, alte super la laŭntenis-placoj de la Akademia Laŭntenisklubo (la loko de la finsoleno de la studenta torĉprocesio okaze de majakcepto) la Katedralruinojn kaj dekstre, ĉe la komenco de Savi-str., la Fiziologian Instituton („Nova Anatomiejo“ — dir. prof. A. Fleisch). Konstruita en 1887/88 de R. Guleke. El la antaŭaj fiziologoj estas nomindaj A. Schmidt (1869—1894) kaj A. Lipschütz (1919—26).

Pli malproksime leviĝas supre ĉe Hetseli-str. la 4-etaĝa domo de la ŝtata Centra Arkivo, konstruita en 1902—04 kiel studenta kunloĝejo.

En la 4-a etaĝo de tiu ĉi konstruaĵo, transdonita nun al la ŝtato, troviĝas ankoraŭ la Meteorologia Observatorio de la universitato (direktoro prof. K. Frisch), centra instituto de la publika veterservo en Estonio. Tie ĉi estas ankaŭ la sisma stacio, provizita per la modernaj sismografoj de Golizõn-Wilip, kiujn oni fabrikas en Tartu ankaŭ por diversaj eksterlandaj institutoj (konstruisto prof. J. Wilip, pretigisto subtilmekanikisto H. Masing).

Tiam ni preterpasas malsupre en la remparfosaĵo la malgrandan pumpejon de la universitato. Maldekstre supre ni ekvidas la larĝan arkon de la Diabla Ponto, betona konstruaĵo el la jaro 1913-a, surhavanta reliefbildon de la caro Aleksandro I (malkovrita okaze de la 300-jarjubilea

soleno de la dinastio Romanov). La origina ponto, starigita en 1844, ruiniĝis jam pli frue.

Malsupre en la remparfosaĵo staras ankoraŭ malgranda kolono kun surskriboj en 4 lingvoj. Tie, kien oni translokigis la ostarojn de la loko, kie troviĝis ĝis 1707 Maria-preĝego kun tombejo, sed poste estis starigita la ĉef-konstruaĵo de la Universitato.

De la remparfosaĵo ni foriras ĉe ĝia kruciĝo kun Maarjamõisa-str., ĉe kiu staras la Okulkliniko (konstruita en 1867. Dir. doc. J. Uudelt).

Maldekstre en la direkto de Pepleri-str. ni vidas antaŭ ni la Maria-preĝejon, trinavan preĝejon en malfruklasicista stilo kun inklinoj al la romana. Konstruita en 1834—42.

Universitataj konstruajoj el la periodo de rusigo.

La universitataj konstruaĵoj, troviĝantaj sur kaj ĉe la Kastela Monto, devenas plejparte el la komenco kaj mezo de la 19-a jarcento, el la germana periodo de la Universitato.

En 1889 komenciĝis periodo de rusiĝado, kiu kaŭzis fundamentajn ŝanĝojn same en la konsisto de la instruantaro, kiel en tiu de la lernantaro (en 1894 oni eĉ ŝanĝis la nomon de la urbo je Jurjev). Komence ĉi tiuj ŝanĝoj esence ne estis tre pozitivaj, tamen finance ili signifis plibonigon (salajroj, etato). La komenco de la 20-a jarcento alportis fortan alkreskon de studentoj. Per alkonstruaĵoj oni preparis ankoraŭ pli grandan plivastigon de la rusa universitato. Dum 1911—13 la Virina Kliniko estis rekonstruata kaj plivastigata. Samtempe oni komencis la konstruadon de sciencaj institutoj ĉe Aia-str., same la konstruadon de du novaj klinikoj ekster la urbo sur la kampo de Maarjamõisa. Finkonstruite nur dum la mondmilito, ĉi tiuj konstruaĵoj povis esti aplikitaj por sia origina celo nur post la malfermo de la estona universitato.

De la Maria-preĝejo oni venas tra Pepleri-strato al Aia-strato, kie tuj dekstre vidiĝas la granda konstuaĵo de la „Nova Universitato". Gi ampleksas grandan nombron da institutoj kaj muzeoj.

Zoologiaj Instituto kaj muzeo, II etaĝo (direktoro prof. H. Riikoja). En tri grandaj muzeaj salonoj en la granda nombro da ekzotikaj kaj enlandaj bestoj estas precipe rimarkinda la ekspozicio de enlandaj birdoj.

Geologia Instituto kaj Muzeo kun Mineralogia Instituto, dekstre, I. etaĝo (direktoro prof. A. Öpik). En la kolekto speciale rimarkinda estas kolekto de meteoritoj kaj la unika kolekto da devonaj fiŝoj el la kavernoj de Aruküla proksime al Tartu, de H. Asmuss. Ambaŭ muzeoj estas malfermitaj dimanĉe, marde kaj vendrede de la 10-a ĝis la 2-a. El antaŭaj konataj geologoj oni



La Urbdomo kaj Suurturg de la ŝtonponto.

povas nomi O. N. Abich (1842—47), C. Grewingk (1852—1887), N. Andrussov (1897—1905).

Arkeologia Instituto (direktoro prof. H. Moora), Geografia Instituto (dir. prof. A. Tammekann), Higiena Instituto (dir. prof. A. Rammul), Bakteriologia Instituto (dir. prof. K. Schlossmann), tri Arbarsciencaj Institutoj kaj Arbarmuzeo (prof. H. Mathiesen, docento O. Daniel kaj K. Verberg), bibliotekoj de la Naturesplorista Societo (fond. en 1854) kaj la Societo de Estonaj Scienculoj (fond. en 1838) kompletigas la liston de la institucioj en tiu-ĉi konstruaĵo.

Kontraŭ la universitata konstruaĵo troviĝas la Germana Teatro, konstruita en 1918. La konstruaĵo, havanta estetike belan eksteraĵon kaj oportunan internan instalon, estas nur duone uzata (Estona Laborista Teatro kaj hazardaj gastprezentadoj).

En la domo ĉe Aia-strato 42 troviĝas la Arkiva Biblioteko de la Estona Nacia Muzeo kun diversaj aliaj kultursciencaj arkivoj kaj kolektejoj. Tie ĉi

ni trovas la plej kompletan kolekton de la estona literaturo kaj folkloro.

Por atingi la malsanulejojn sur Maarjamõisa Kampo oni povas de la Urbdoma Placo uzi omnibuson aŭ eliri de Aia-str. tra Riia-str.

Samtempe oni povas viziti la ĝardenurbon, estiĝintan dum la lastaj 10 jaroj ĉe la klinikoj (Tammeväli). La klinikoj (en 2 domoj, konstruitaj en 1914) konsistas el la II Kliniko por Internaj Malsanoj (dir. doc. V. Vadi) kaj el la Nervkliniko (dir. prof. L. Puusepp, konata pro multnombraj sciencaj laboroj kaj speciale pro siaj operacioj de cerb-tumoroj).

La dua konstruaĵo estas okupita de la II Kirurgia Kliniko (dir. prof. K. Konik).

Tiuj-ĉi malsanulejoj plenumas ankaŭ publikajn taskojn kiel fleginstitucioj de la urbo, ŝtato kaj komunumoj.

De Riia-strato al la Urbdoma placo.

Dum reveno al urbo tra Riia-str. ni rigardas la novan Paulus-preĝejon, kiu estas konstruita nur en 1915 en moderna finna stilo laŭ projekto de finna arkitekto G. E. Saarinen. Impona simpleco karakterizas ne nur la eksteraĵon, sed ankaŭ la internon de la preĝejo. Anstataŭ altarbildo staras marmorgrupo de prof. A. Adamson, reprezentanta Kriston kaj la pekulojn.

La mezurbon oni povas atingi senpere de Riia-str. — la ĉefa trafikvejno — trapasante la placon antaŭ la ĉevalpoŝta stacio.

Estas rekomendinde turni en la Pepleri-straton por vidi la Higienan Muzeon de la Estona Kuracista Asocio, troviĝantan ĉe tiu-ĉi strato (nr. 32) kaj de tie alveni tra Aia-str. al la malsupra urbo. Aia-strato 35 troviĝas la Supera Stata Juĝejo (Senato — Riigikohus), en kies konstruaĵo en 1920 estas subskribita la packontrakto de Estonio kun U. S. S. R.

Aia-strato 6 estas vidinda la teatro kaj societa domo „Vanemuine“, konstruita de finna arkitekto A. Lindgren en 1906, ĝi estis la unua moderna estona teatrejo kun konstanta aktora trupo kaj havis grandan signifon en la estona societa vivo ne nur de la hejmurbo. Bedaŭrinde la teatrejo ne havas plene imponan aspekton pro distancmanko (simile kiel la Paŭlus-preĝejo).

Ce la malsupra fino de Aia-strato ni reatingas la ĉefan trafik- kaj negocvejnon de la urbo, trapasas la Promenaadistraton kun la stranga miksaĵo de konstruheredaĵoj el delonge pasinta periodo kaj kun modernaj konstruaĵoj, kaj venas antaŭ la Komercejaron (konstruitan en 1819) kontraŭ la malgranda parketo de la Barclay-placo.

Sur ĝi troviĝas la monumento de general-feld-

Rigardo al Suurturg de la Urbdomo.

marŝalo Barklay de Tolly (malkovrita la 11-an de nov. 1848), starigita de la oficiroj de la I. rusa armekorpuso, kiun B. de T. komandadis en la batalo kontraŭ Napoleono I (en 1812—14).

La parketo samkiel la Komercejaro troviĝas sur la loko, kie la mezepoka urbomuro etendiĝis de la Kastela Monto al la rivero.

La Urbdoma placo.

Alveninte al la „Granda Bazarplaco", ni vizitas la Urbdomon, konstruitan en 1782—89 de masonisto-majstro J. H. B. Valther, laŭ propraj projektoj, en klasicista stilo, post kiam la granda brulo en 1775 detruis la malnovan, konstruitan en 1698. La turo devenas el pli nova konstruperiodo kaj ne harmonias kun la arkitekturo de la Urbdomo. La permeson por vizitado de la Urbdomo donas la urba sekretario. Nuntempe urbestro estas s-ro K. Luik, urba sekretario — s-ro A. Mägi.

La „malnova universitato" sur la angulo de Rüütli-str. estas jam supre menciita. La domoj ĉe la Urbdoma placo estas plejparte konstruitaj en la fino de la 18-a jarcento. El la sama tempo (1776—84) devenas ankaŭ la ŝtonponto, kiu portas latinan surskribon, laŭ kiu ĝi estas konstruita laŭ ordono de Katarina II kiel la unua ŝtona ponto en Livlando.

Estu menciite, ke proksime de la Urbdoma placo ĉe la Viandbazaro surskribo sur la pordo de kelo montras, ke tie la 14. I 1919 la bolŝevikoj mortigis 18 malliberigitojn.

Ambaŭflanke de la Urbdoma placo etendiĝas apud la rivero la bazaro.

TARTU ÜLIKOOLI
RAAMATUKOGU

Rigardo al ŝtonponto.

De la Universitata čefkonstruaĵo al Raadi.

Ekirinte denove de la Universitata ĉefkonstruaĵo, ni renkontas vicon da novkonstruaĵoj kaj novakiraĵoj el la lasta — la estona — epoko de la Universitato.

Tuj, maldekstre, ĉe la Universitato (Jaani-str. 26) estas la Studenta Domo. La domon rekonstruigis, ĝin ŝanĝante, la universitatestraro kaj disponigis ĝin al la studentaro. Ciuj studantoj de la universitato aŭtomate jam apartenas al la studentaro kiel ĝiaj membroj kaj elektas ĉiujare sur demokratia bazo 30-personan reprezentantaron, formantan la S t u d e n t p a r l a m e n t o n. La estraro de tiu ĉi delegitaro reprezentas la studentaron en ĉiuj ĝeneralaj aferoj, precipe en rilatoj kun la Universitato. La delegitaro penas laŭeble akceli la kulturajn kaj materiajn interesojn de la studantoj. En la Studenta Domo trovis loĝejon vico da studentaj organizaĵoj, la organoj de la delegitaro por la memhelpo, por la interkomunikiĝo kun aliaj studentaroj, por la korpkulturo kpt. Tie ĉi troviĝas salono-legejo, granda manĝejo por studentoj, ĉi tie estas la redaktejo de „Üliõpilasleht“ (Studenta Gazeto). Nuntempe (1932) stud. jur. Ilmar Tõniste (Tõnisson) estas prezidanto de la studenta delegitaro.

De la Studenta Domo nia vojo turniĝas preter la Gustav-Adolf-monumento al Jakobi-str. kaj ni rimarkas dekstre ĉe la angulo de Lutsu-str. la Gimnastikejon de la Universitato, konstruita en 1928—29 por la Instituto por Korpekzercoj fondita en la estona epoko.

Emajõgi kun barkoj.

Tra Lutsu-str., preter la sola preĝejo, konserviĝinta el la mezepoko, la preĝejo de Sankta Johano (proksimume el la13-a aŭ 14-a jarcento) kaj preter la malmultaj domoj, sole restigitaj de la granda brulado en 1775, ni reatingas Rüütli-straton kaj de tie maldekstre Lai-straton. Rekte kontraŭ Rüütli-str. 36 troviĝas domo — speciale aĉetita de la universitato — en kiu estas lokigitaj diversaj institutoj de la filozofia fakultato (arthistorio, eksperimenta psikologio kaj pedagogio, eksperimenta fonetiko) kaj de la agrikultura fakultato (kampkulturiloj, arkitekturo, kulturtekniko kaj geodezio) — preskaŭ ĉiuj estas novkreaĵoj de la estona universitatepoko.

Plue — ĉe la strato, kondukanta malsupren al la rivero Emajõgi (Patrinrivero), troviĝas ĉe Lai-str. 35, la oficejo de „Eesti Kirjanduse Selts", (Estona Literatura Societo), societo preninta en 1907 sur sin, kiel ĉefan taskon la kulturadon de la estonaj literaturo kaj scienco.

Maldekstre ni iras laŭlonge de la muro de la Botanika ĝardeno, fondita sur tiu ĉi loko jam en 1806. La rigardado de tiu ĉi ĝardeno kun ĝiaj orangerioj (malfermita por la publiko de majo ĝis septembro ĉiutage de la 9-a ĝis la 12-a kaj de la 14-a ĝis la 18-a) estas tre rekomendinda.

Tie ĉi laboris konataj botanikistoj, kiel K. Chr. F. Ledebour (1811—36), E. Chr. Trautfetter, A. Bunge (1836—68),



Ponto de Libereco.

G. M. Willkomm (1868—74), E. Russow (1874—95), F. Buchholtz (1919—24). La nuna direktoro estas prof. Th. Lippmaa.

Ni transiras Emajõgi laŭ la ponto de Libereco, betona ponto, konstruita anstataŭ forbrulinta ligna ponto en 1924—1925. Laŭ Vene-str. ni alvenas al la komplekso de la Veterinaraj Institutoj, formintaj antaŭ 1919 memstaran altlernejon. Krom la diversaj fakoj de ĉi tiu fakultato, ekzistintaj jam antaŭe, ĉi tie lastatempe estas lokitaj ankaŭ kelkaj noveformitaj (Pasteur-instituto por la kontraŭbatalo de la rabio, instituto por teresploro kaj de agrikultura kemio).

Deturniĝo al Tallinna-str. komenciĝante ĉi tie kondukas nin al la Kliniko por Psikmalsanoj (n-ro 48) (de post 1880) — (dir. prof. M. Bresowsky). El la aro de la antaŭaj psikiatroj estas nomindaj E. Kraepelin (1886—91) kaj V. Tšiž (1891—1917).

Revenante al Narva-str., ni vidas maldekstre la preĝejon de Sankta Petro (1882—84), konstruitan en novgotika stilo.

De tie ĉi restis ankoraŭ 1 kilometro laŭ Narva-str. ĝis Raadi, kie troviĝas la Eksperimentaj Institutoj de la agrikultura fakultato (por vegetaĵmalsanoj kaj -domaĝuloj, kulturtekniko, agrikultura kemio, vegetaĵbiologio, zootekniko) kaj la Estona Nacia Muzeo. Precipe la lasta (vizitebla por la publiko dum la tuta jaro de la 11-a aŭ 12-a ĝis la 14-a, krom lundo) prezentas multegon da etnografiaj, arkeologiaj kaj artaj objektoj en moderna laŭscienca grupiĝo. La Muzeo, kiun kreis societo, fondita en 1908 kaj subtenita nur per privataj monrimedoj ĝis la memstarigo de Estonio, nur de tiu ĉi tempo ricevas ŝtatan subvencion; ĝi troviĝas de 1922

Estona Nacia Muzeo.

en la nuna domo, la iama palaco de la bieno Raadi (eksposedaĵo de la familio de artŝatanto kaj mecenoj von Liphart); dir. F. Leinbock.

Rigardo al la studenta vivo en Tartu.

Ni faru mallongan observadon pri la plej gravaj organizaĵoj de studentoj en Tartu.

Veturante de la stacidomo al la urbo, ni rimarkas (ĉe Viljandi-str. 1) la ruĝblankan domon de „Eesti Üliõpilaste Selts“ (EÜS — Societo de Estonaj Studentoj). La domo estas konstruita en 1902 (arkit. K. Hellat), en 1930 plivastigita. Sed la societo ekzistas de 1870. Estante ĝis 1906 la sola estona unuiĝo de studentoj en Tartu, ankoraŭ nun ĝi estas la plej granda. La estonaj nacikoloroj origine evoluis en tiu societo kiel koloroj de la korporacio (1881). La plej malnova originala ekzemplero de la standardo en tiuj koloroj (1884) apartenas al la Societo; ĝi emblemiĝis sur la kampo de l'naciaj kulturceladoj.

El EÜS devenis multaj aliaj organizaĵoj. Inter ili reformkorporacio „Sakala“, kiu formiĝis en 1909, havas propran ejon (proksime al EÜS, Veski-str. 67). La domo estas modernstila, kun loĝejoj por kelkaj studentoj.

El aliaj estonaj studentunuiĝoj korporacio „Vironia“ havas ankaŭ propran domon (Lai-str. 30); ĝi estas la plej malnova el la ekzistantaj estonaj korporacioj, fondita en Riga 1900 (ĉe tiea politeknika altlernejo). Al ĝiaj filistroj apartenas multaj inĝenieroj kaj financistoj de la malnova generacio.

La domo de „Eesti Üliõpilaste Selts“ (Estona Studenta Societo).

Same kiel la domo de „Vironia“, tiel ankaŭ la domoj de la aliaj organizaĵoj, kiuj havas luloĝejojn, estas malpli rimarkeblaj sur la urbbildo ol la domoj speciale konstruitaj por tio. Kiel domoj de korporacioj ili estas rimarkeblaj nur dum la lernosezonoj per la flirtantaj standardoj sur tegmentoj.

La parte centjaraj germanaj korporacioj, koncerne siajn domojn, estas en pli bona stato. Irinte de EÜS laŭ Kastani-str. oni atingas la vilaosimilan korporaciejon de „Neobaltia“ (fond. 1879). Tie proksime, ĉe Veski-str. 25, estas la malgranda duetaĝa domo de „Frat. Academica“ (fond. 1881), ĉe la sama strato n-ro 13 troviĝas la malnova domo de „Livonia“ (fond. 1822). La plej malnova germana regiona unuiĝo „Estonia“ (fond. 1821) havas ĉe Vallikraavi-str. 9 apenaŭ rimarkeblan loĝejon.

La privilegij, kiujn ĝuis la germanaj korporacioj dum la dua duono de la 19. jarcento en la akademia vivo, estis allogaj por la postaj generacioj de la studentoj. Ekde 1906 la nombro de estonaj studentoj kaj iliaj organizaĵoj kreskas rapide. En 1918 ekzistas 4 korporacioj kaj 3 societoj, — nun 15 korporacioj kun cirkaŭ 800 anoj kaj 15 societoj kun ankoraŭ pli granda nombro de anoj, inter ili 4 regionaj unuiĝoj. Krom tio estas ĉirkaŭ 30 akademiaj societoj, kiuj havas sciencajn kaj kulturajn celojn kaj al kiuj povas aliĝi la organizitaj kaj neorganizitaj studentoj. Ekzistas 18 neestonaj organizaĵoj.



Studenta plezurveturo en la XIX jarcento.

Statistiko pri la Universitata jubilea jaro.

La I. de decembro 1931 Tartua Universitato havis 73 profesorojn kaj 24 docentojn, 33 privatdocentojn, 24 personojn kun instrutaskoj kaj 31 helpinstruantojn, entute 185 instruistojn. Al tiu ĉi nombro aldoniĝas 136 asistantoj kaj diversaj teknikaj helpantoj.

Dum la sama tempo estis da studentoj 3305 (2244 vir., 1061 virin.), kiuj dividiĝis laŭ la fakultatoj jene: teologio 108 (101+7 *); juro 707 (654+53); ekonomio 594 (376+218); medicino 327 (203+124); farmacio 219 (81+138); filologio 533 (142+391); matematiko kaj naturscienco 265 (180+85); veterinarscienco 158 (152+6); agrikulturo kaj forstokulturo 394 (355+39).

Laŭ nacieco estis 2687 (81,3%) estonoj; 251 (7,6%) germanoj; 164 (5%) rusoj; 109 (3,3%) hebreoj; 9 (0,3%) finnoj; 16 (0,5%) svedoj; 29 (0,9%) latvoj; 2 (0,06%) litovoj; 9(0,3%) poloj, angloj, francoj, svisoj, danoj, ukrainoj kaj kaŭkazanoj. Komparante la nombrojn kun la nombroj de la naciecoj en la regno, estas la germanoj kaj ankoraŭ pli grandare la hebreoj supernormale prezentitaj.

*) Inter la krampoj la unua nombro signifas studentojn kaj la dua studentinojn.



Hotelo „Liivimaa“.

Sciigoj.

Gastejoj: Grand Hotel — Vallikraavi-strato 10 (tel. 3-23). „Liivimaa“ — Riia-str. 91 (tel. 2-28). „Commerce“ — Riia-str. 43 (tel. 6-93). „Peterburg“ — Uueturu-str. 22 (tel. 5-76). ‚Central“ — Kaluri-str. 2 (tel. 6-40).

Manĝejoj: Naiste Karskusliit — Jakobi-str. 12 (tel. 9-99). Üliõpilassöögisaal — Studenta domo, Jaani-str. 26 (tel. 2-91). „Athena“ — Küütri-str. 1 (tel. 4-03).

Restoracioj: „Vanemuine“ — Aia-str. 6 (en la teatra domo, tel. 40). „Segerlin“ — Küütri-str. 5 (tel. 5-12).

Kafejoj: „Athena“ — Küütri-str. 1 (tel. 4-03). „Werner“ — Jaani-str. 7 (tel. 6-10).

Adresburoo: Jaani-str. 9, tel. 1-46. Malfermita 8—14.30, ĉiusabate de 10—13, ĉiudimanĉe de 14—16. Krom tio dum labortagoj de 18—20.

Vojaĝburoo: Suurturg 7, tel. 3—72. Malfermita de 9—17; filio: stacidomo.

Konsulejoj: Germanujo: Vickonsulejo Kastani-str. 37, tel. 3—97. Francujo: Ag. konsulo (hon.) Adalb. Kurruk, Vabaduse puiestik 7, tel. 3-15. Svedujo: Ag. konsulo (hon.) Jul. Lill, Aleksandri-str. 44, tel. 9—85. Finnlando: Konsulo (hon.) Oskar Rüütli, Aia-str. 34, tel. 6-79. Buroo Suurturg 3, tel. 5-43. Belgujo: Vickonsulo Hugo Vihalem, buroo Suurturg 3, tel. 9-47.

Librovendejoj: Akademia Kooperativo, Jaani-str. 7, tel. 63; J. Raudsepp, Küüni-str. 1, tel. 2-66; I. G. Krüger,

Rüütli-str. 11, tel. 7-60. Plejparte estonlingvaj libroj: „Postimees", Suurturg 16, tel. 2-50; „Noor-Eesti", Rüütli-str. 4, tel. 2-66; G. Roht, Promenaadi-str. 6, tel. 4.

Poŝtejo: Rüütli-str. 17. Filio en stacidomo, sude de la ĉefkonstruajo. Funkcitempo ĝis la 15, dimanĉe de 9—11.

Taksometro: 1) kun la blanka signo: tage — unua kilometro kr. 0.30, ĉiuj sekvontaj 500 m — kr. 0.15, nokte (24—6) kr. 0.40 kaj 0.20; 2) kun blua signo: tage kr. 0.45 kaj 0.20; nokte 0.60 kaj 0.30; 3) kun flava signo: tage kr. 0.65 kaj 0.30; nokte kr. 0.80 kaj 0.40.

Fiakristoj: Unuĉevala — mallonga veturo en la urbo kr. 0.30—0.40; pli longa kr. 0.55—0.75. Laŭhora veturo kr. 1.—

Aŭtobusoj: ĉefa vojo — de la stacidomo tra la ĉefaj stratoj ĝis Peetri-preĝejo. De Suurturg al la stratoj — Tähe, Võru, Riia. Veturprezo: kr. 0.10—0.15.

Prefektejo: Kompani-str. 10, tel. 7. Malfermita de 8—14.30, sabate de 10—13.

Kriminalkomisaro: Gildi-str. 12, tel. 13 kaj 3-06.

Bankoj: Eesti Pank — Kompani-str. 2 (tel. 7-18). Monoŝanĝo kpt. dum labortagoj de 9—14, sabate ĝis la 12-a. Tartu Pank — Suurturg 20 (tel. 3-18; 6—86). Kauba-Pank — Suurturg 12 (tel. 1-83; 9). Linna-Pank — en la Urbdomo. I Eesti Laenu- ja Hoiu-Ühisus — Suurturg 14 (tel. 1-77).

Tartua Esperanto-Societo: Gildi-str. 8; kunvenoj ĉiudimanĉe 6—9 vesp.

Akademia Esperantoklubo: Studenta domo.

Literaturo pri Tartu kaj la Universitato.

Tartu (Estonlingva monografio kun franclingva rezumo) Tartu, 1927. Pli ol 700 paĝoj, riĉe ilustrita, kun pluraj kartoj kaj planoj. Eldono de la Urbestraro. Prezo — kr. 16.50.

Louis Villecourt, **L'université de Tartu 1919—1932. Tartu 1932.**

Literaturo pri Estonio:

The Estonian Year-Book **1927, 1929 and 1930 by** *Albert Pullerits* **Tallinna.**

Louis Villecourt, **L'Estonie, Paris, Rieder 1931. Kr. 2.70,**

Albert Pullerits, **Estland — Volk, Kultur, Wirtschaft. Tallinna 1931. Kr. 5.—.**

Hans Kruus, **Grundriss der Geschichte des estnischen Volkes. Ak. Kooper. Tartu 1932. Kr. 4.—.**

Oskar Loorits, Estnische Volksdichtung und Mythologie. Ak. Kooper. Tartu 1932. Kr. 1.50.

H. Moora, Die Vorzeit Estlands. Ak. Kooper. Tartu 1932. Kr. 2.20.

A. Saareste, Die estnische Sprache. Ak. Kooper. Tartu 1932. Kr. 1.—.

F. Leinbok, Die materielle Kultur der Esten. Ak. Kooper. Tartu 1932.

Listo de plej gravaj konstruajoj kaj institucioj en Tartu,

montritaj sur la aldonita plano. Numeroj dekstre de nomoj indikas la koncernajn ciferojn sur la plano.

1.	Senato	46
2.	Centra Arkivo — Meteorol. Observatorio	39
3.	Adresburoo	24
4.	Poŝto, telegrafo, telefono	27
5.	Stacidomo	36
6.	Distrikta administraro	52
7.	Urbdomo	32
8.	Urba knabina gimnazio	50
9.	Knabina gimnazio de Estona Societo de Junulare-dukado	37
10.	Urba gimnazio	62
11.	Knaba gimnazio de H. Treffner	22
12.	Komerca gimnazio	34
13.	Pedagogiumo	44
14.	Vespera gimnazio kaj XV komenclernejo	63
15.	Germana gimnazio	16
16.	Rusa gimnazio	29
17.	Muzika altlernejo	18
18.	Artlernejo „Pallas“	51
19.	Urba industrilernejo	5
20.	Mastrumadlernejo de Estona Virina Societo	25
21.	Manlaborlernejo de Estona Virina Unuiĝo	55
22.	I komenclernejo por knabinoj	17
23.	III „ „ knaboj	9
24.	V „ „ knabinoj	67
25.	VI „ „ „	33
26.	IX „ „ „	59
27.	X „ „ „	4
28.	XII „ „ „ kaj knaboj	10
29.	XVI „ „ „ „ „	35
30.	Urbaj biblioteko kaj legejo	30

31. Urba elektrofabriko 56
32. „ gasfabriko 69
33. „ buĉejo 72
34. „ malsanulejo por infektaj malsanoj 68
35. Telefonfabriko 3
36. Estona Banko, Tartua filio 31
37. Vendejaro 53
38. Universitata ĉefkonstruaĵo 20
39. Veterinaraj Institutoj 6
40. Nova universitata konstruaĵo 60
41. Botanika ĝardeno 26
42. Nova Anatomiejo 38
43. Anatomiejo 42
44. Astronomia observatorio 45
45. Universitata biblioteko kaj Katedralruinoj 13
46. Estona Nacia Muzeo 1
47. La arkivbiblioteko de la Estona Nacia Muzeo . . 64
48. Higiena Muzeo 65
49. Studenta domo 23
50. I kirurgia malsanulejo 14
51. I malsanulejo de internaj malsanoj 15
52. Virina malsanulejo 41
53. Infana malsanulejo 12
54. Okulmalsanulejo 40
55. Psikiatria malsanulejo 2
56. II kirurgia malsanulejo 70
57. II malsanulejo por internaj malsanoj ka nerv-malsanulejo 71
58. Institucio de Mellin 47
59. Privata malsanulejo de estonaj kuracistoj 49
60. Fajrobrigadejo 54
61. Estona Abstinenca Ligo 19
62. „Vanemuine“-teatro 48
63. Germana teatro 58
64. Paulus-preĝejo 61
65. Maria-preĝejo 43
66. Peetri-preĝejo 8
67. Johano-preĝejo 21
69. Aleksandro-Nevski-preĝejo 73
69. Alekander-Nevski-preĝejo 73
70. St. Georga-preĝejo 7
71. Uspenski-preĝejo 28
72. Sinagogo 57

Dum la uzado de la plano kaj teksto
oni petas afable atenti jenon:

Okase de la 300-jara jubileo de la Universitato jenaj stratoj estas alinomitaj:

Estintaj nomoj:	Nunaj nomoj:
Jaani- kaj Vana-stratoj	**Ülikooli-strato.**
Jakobi- kaj Küütri-stratoj	**Gustav-Adolfi-strato.**
Munga-strato	**Peeter Põllu-strato.**

TÜ RAAMATUKOGU
1030001695918 3

G. Roht'I trükk, Tartus 1932

Akadeemiline Kooperatiiv
Akademia Kooperativo

Tartu, Ülikooli (Jaani) 7, tel. 63.

Libro- kaj skribmaterialvendejo. Informliteraturo. Eldonejo kaj tenejo de akademiaj eldonaĵoj. Belaj ledaj manlaboroj kaj artbindado Ed. Taska.

Akcepto de gazet- kaj ĵurnalabonoj.

ASEKURSOCIETO „EESTI"

(fond. 1907).

La plej granda hejmlanda kooperativa asekura entrepreno.

Fajr- kaj vivasekuro, aliaj asekurspecoj.

Elpagite por 3000 akcidentoj entute kr. 200.000.000.

ADMINISTRACIO: TARTU, SUURTURG 8.

Telef. 172 kaj 13-57.

Est
A-4663
31011



Tartu Linnapank
Tartua Urbbanko

Tartus, Raekojas } Telef. 11-32.
Tartu, Urbdomo }

Võtab raha hoiule.
Akceptes ŝparsumojn.

Annab laene.
Pruntedonas monon.

Ostab ja müüb välisraha ja välistsekke.

Aĉetas kaj vendas valuton kaj eksterlandajn ĉekojn.

Toimetab kõiki pangaoperatsic
Aranĝas ĉiuju bankaferojn.

Saadaval hoiukarbid.
Haveblaj ŝparskatoloj.